

N. N. 32,  
 Jen ĉiamviva Rozo  
*tradukita de Leland Bryant Ross*

Jen ĉiamviva Rozo  
 laŭ vorto de profet'  
 El la Jiŝaja ŝoso  
 ekkreskis kun impet'.  
 Ĝi venis, hela Flor',  
 en frida tempo vintra  
 Je noktomeza hor'.

Jesaja ĝin anoncis,  
 la menciita Flor';  
 Maria ĝin responsis  
 el patrin-ama kor'.  
 Ŝi naskis Rozon por  
 klarigi Dian amon  
 Je noktomeza hor'.

Ĉi tiu milda Floro  
 per sia dolĉ-arom'  
 Heligas per Digloro  
 la vojon de la hom'.  
 Ja homo, tamen Di',  
 ĝi ŝarĝojn malpezigas  
 Kaj homojn savas ĝi.

...

N. N. 32,  
 Elkreskis rozbranĉeto  
*tradukita de Joachim Gießner*

1. Elkreskis rozbranĉeto  
 el rozarbust' de Di'.  
 Aŭguro de profeto  
 rakontis jam pri ĝi.  
 Naskiĝis rozfloreto  
 meze en vintra nokto  
 laŭ diro de profet'.

2. Ja naskis tiu rozo -  
 Jesaj' prognozis ĝin -  
 el sia korpo sproson  
 Mari' la virgulin'.  
 Laŭ dipotenca vol'  
 ŝi naskis Di-infanon  
 por tuta mond' konsol'.

3. Kaj tiu belfloreto  
 tre hele lumas ĝi.  
 Obskuron la brileto  
 forprenas nun de ni.  
 Vi hom' kaj vera Di'  
 el pekoj kaj suferoj  
 estas savant' por ni.

...

N. N. 32,  
 Rozbranĉo forĝermadis  
*tradukita de Felix Ney*

Rozbranĉo forĝermadis  
 el trunk' de nobelec'.  
 Prauloj jam kantadis:  
 de Jiŝaj ĝia spec'.  
 Floreton portis ĝi,  
 en akra vintro estis,  
 Je horo de noktmez'.

La branĉo anoncita  
 Jesaja de profet':  
 Maria netuŝita,  
 de kiu la floret'.  
 Eterne volis Di':  
 naskinta infaneton  
 Plej pura restis ŝi.

De tiu eta floro  
 alvenas bonodor'  
 Ĝi brilas en la koro,  
 mallumon pelas for.  
 Homido, Dia Vort',  
 nin el sufero helpas,  
 De pek' Savant' kaj mort'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de LELAND BRYANT ROSS (Ros’ Haruo).*

*Arg-618-1247 (2014-09-08 13:06:28)*

*Tiu ĉi traduko troviĝas en <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/j/jencxiamv1.html>. Pluaj tradukoj de la sama aŭtoro troviĝas sub [http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros\\_h.html](http://www.reocities.com/cigneto/thcbio/r/ros_h.html). Pri la tradukinto vidu la facebook-paĝon <https://www.facebook.com/leland.ross/photos>.*

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-618-1244 (2012-10-18 21:24:22)*

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.esperanto.de/kantoj/index-giessner.html>. sub <http://www.esperanto.de/kantoj/kantoj.pdf>.*

*Traduko de la Germana poemo “Es ist ein Ros entsprungen” de N. N. 32 en Esperanton de Felix Ney.*

*Arg-618-1246 (2012-10-18 22:27:59)*

*Tiu ĉi Esperantigo troviĝas en la retejo <http://www.reocities.com/cigneto/thctxt/r/rozbrancx1.html>.*